

# POLA ESPERANTISTO

---

---

JARO XXIII. \* OKTOBRO 1929. \* N-o 10.



ROK XXIII. \* PAŹDZIERNIK 1929. \* Nr. 10.

---

---

# ESPERANTYSTA POLSKI





# POLA ESPERANTISTO

MONATA REVUO DE ESPERANTISTA MOVADO EN POLUJO  
KAJ EKSTERLANDE.

## ESPERANTYSTA POLSKI

MIESIĘCZNY PRZEGLĄD RUCHU ESPERANCKIEGO W POLSCE  
I ZAGRANICĄ.

ROK XXIII. JARO.

KRAKÓW  
PAŹDZIER. 1929 OKTOBRO

Nr. 10 N-o

### AL MINISTRO BRIAND

OKAZE DE LA PROPONO PRI UNUIGITAJ ŜTATOJ DE EŬROPO  
LETERO MALFERMITA DE „POLA ESPERANTO-ASOCIO“.

Tre estimata Sinjoro Ministro!



a preso sciigis la tutan mondon pri Via propono de Unuigitaj Ŝtatoj Eŭropaj. Ne estas nia celo pridiskutadi la proponon, sed ni esperantistoj volas al Vi, Sinjoro Ministro, prezenti kiamaniere Via propono povus esti forte subtenata kaj trovi fruktoportan helpon flanke de esperantistoj, se Vi, Sinjoro Ministro, volus profiti de ilia helpo.

Unuigitaj Ŝtatoj de multlingva Eŭropo, kiam-ajn ili efektiviĝos, postulas komunan helpan lingvon. Utopiajn iluziojn, ke ĝi povus esti la franca, klare forblovis la diskuto, kiu antaŭ kelkaj jaroj okazis en Francujo post elpaŝo de ministro Henriko Berard, volanta sufoki esp. movadon por favorigi la francan lingvon kiel internacian. Pri grandeco de esp. movado Vi, Sinjoro Ministro, povus informiĝi, krom lasta statistiko de prof. Dietterle, ankaŭ el oficiala raporto pri esperantismo de I. Nitobé, ĝenerala sekretario de Ligo de Nacioj, por kiu li ĝin ellaboris.

Ni esperantistoj prezentas al Vi, Ministro, por afabla trapenso jenan nian proponon:

Se esperanto Zamenhofa estus enkondukota en unu lando de-  
vige en la lernejoj, ĝi ne donus tro grandajn rezultojn, ĉar la civitanoj  
de tiu-ĉi lando, forveturinte ekster ĝiaj limoj, trovus nur malgrandajn  
grupetojn da esperantistoj. Se tamen samtempe ĝi estus enkon-  
dukota k o m e n c e minimume en ses landoj, ĝi venkus tre rapide.

Tial ni proponas: ke Francujo konsentinte kun la direktantaj  
faktoroj de esp. movado kunvoku konferencon de reprezentantoj de  
eŭropaj kaj eble ankaŭ aliaj ŝtatoj por subskribi jenan Akordon Espe-  
rantan: „Ni (Francujo, Polujo, k. t. pl.) promesas enkonduki Esperan-  
ton Zamenhofan devige en la lernejoj de la tuta lando, se samtempe  
la samon subskribos minimume kvin aliaj ŝtatoj“ (sekve kune ses).



Se tia Akordo estus subskribita, la ĝisnunaj esperantistoj jam pere de ministerioj de publika instruado preparos tre rapide la instruistaron de tiu-ĉi lingvo kaj la lernolibrojn. Iliaj celoj estos sukcese efektivigotaj.

Tia iniciativo varbos al Vi, estimata Sinjoro Ministro, kaj al Via lando ne nur dankemon, sed ankaŭ la senmortan gloron, ĉar ĝi pridonacos ne nur Eŭropon, sed ankaŭ la tutan homaron pri komuna, helpla lingvo, kompreneble ne foriganta la naciajn. Venontaj jarcentoj kaj generacioj Vin dankeme riverencos pro la ekkomenco de nova periodo de homara historio.

Por ke Francujo ne estu soleca en tiu-ĉi iniciativo, estus dezirinde, ke ĝi interkonsentu kun ia alia ŝtato. ekz. Polujo, patrujo de Esperanto, kiu laŭ niaj scioj kaj antaŭvidoj verŝajne ankaŭ elpaŝos konkorde kun Francujo en tiu-ĉi granda iniciativo. Ni, niaflanke, tutforte helpos Vin, Sinjoro Ministro. Granda armeo da pacemaj batalantoj esperantistaj tuj mobilizita post Via elpaŝo estos por Via dispono.

Bonvolu akcepti, Sinjoro Ministro, nian plej koran kaj sinceran saluton kaj respekton.

POLA ESPERANTO-ASOCIO.

## 350-JARA JUBILEA FESTO DE LA UNIVERSITATO DE STEFANO BATORY EN WILNO.

**U**nu el plej malnovaj universitatoj de Eŭropo, post Parizo, Kraków, Praha estas universitato en Wilno, fondita en la jaro 1579. Jam dek jarojn antaŭe ekzistis en tiu urbo jezuita kolegio kreita de episkopo Walerjan Protaszewicz apud la preĝejo de s-ta Johano, sed Stefano Batory, pola reĝo, transformis ĝin en Akademion kun kvar fakultatoj: teologia, jura, filozofia kaj de liberaj sciencoj. Pri la medicina fakultato tiutempe oni ankoraŭ ne diskutadis. Stefano Batory, fondinte la Universitaton, donacis al ĝi ĉiujn privilegiojn de Krakova Akademio. Do en tiu tempo ekzistis du egalaj universitatoj en Polujo kaj en unuigita kun ĝi Litovujo: en Kraków, universitato fondita de Jagiełło kun ties edzino Hedvigo (Jadwiga) kaj en Wilno, fondita de Stefan Batory.

Universitato en Wilno glorge plenumadis sian civilizan mision dum pli ol ducent jaroj ĝis 1832. En tiu jaro ĝi estis fermita de la rusa registaro, kiu timis tro grandigintan influon de polaj profesoroj kaj de la pola junularo, precipe de patriotoj — filaretoj, al kiuj apartenis, inter aliaj, plej fame konata pola poeto Adam Mickiewicz, Juliusz Slowacki kaj aliaj kleraj homoj. Verdire precipe dum la lastaj jaroj de sia ekzisto, la universitato en Wilno estis la unua en Polujo: dank' al ĝi oni nomis la urbon Wilno „polaj Atenoj“. Ankaŭ oni ĝin nomis dank' al la multaj belaj pentraĵoj, skulptaĵoj kaj belega arkitekturo de la preĝejoj kaj riĉaj palacoj: pola Firenze (Florenca).

Dum la rusa regado malfeliĉa urbo post la fermo de la universitato multe kaj grave suferis, precipe post la insurekcio en la jaro



1863, kiam multaj patriotoj estis pendigataj aŭ ekzilataj en Siberiajn minejojn.

Post liberigo de Polujo Wilno tute kompreneble devis esti restarigita, kiel malnova sidejo de pola kulturo, samtempe ankaŭ la Universitato de Stefano Batory komencis vivi kaj labori. Sed tio-ĉi okazis nur dank' al la Pola Unua Marŝalo Józef Piłsudski, kiu tuj post liberigo de Wilno revivigis la universitaton, donacante ĝin pro manko de la oficialaj monrimedoj el sia propra poŝo. Tiu propra poŝo ne estis poŝo de iu ajn riĉulo, ĉar Marŝalo ne estas kapitalulo. Li tute simple rifuzis ricevi sian pomonatan salajron kaj resendadis ĝin por la subteno de la universitataj laboratorioj.

Jam dek jaroj forflugis. La Universitato nuntempe vivas modelan vivon de vera fokuso de klerigado por tuta lando, kreskas forte, jam nun publikigas valorajn sciencajn dokumentojn — publikaĵojn el ĉiuj fakoj, kies numero preskaŭ egaligaĵas al la numero de la plej vigla krakova universitato.

La jubilea festo estis vere impona. Alvenis delegitoj el ĉiuj polaj universitatoj kaj altaj lernejoj: politeknikoj kaj akademioj, krom tio ankaŭ kelkaj eksterlandaj universitatoj alsendis siajn delegitojn: Anglujo, Hungarujo, Ĉeĥoslovakujo, Latvujo—multegaj estis salutleteroj el en- kaj eksterlando. Ni ĉiuj ĉeestantoj travivis tute ne kutimajn momentojn vidante, kiel ree kreskas la kultura laboro. Ni devas rimarki, ke la ĉirkaŭoj de Wilno, kvankam eksterordinare belaj, ne posedas ankoraŭ sufiĉe taŭgan terkulturon, nek gravan komercon, nek industrion. Cio devas esti kreita de novaj homoj kaj per novaj aŭ renovigitaj fortoj. En la lando mem ne mankas kulturaj homoj, kiuj ĝis nun ankoraŭ multe suferas pro manko de sufiĉa kapitalo elĉerpita dum multaj malĝojaj jaroj de la milito. Sed oni jam povas rimarki kaj konstati grandan progreson. Parolante kun la loĝantaro, kiu konsistas precipe el blankrusoj, kies lingvo estas tre simila al la pola, oni konstatas, ke ĉi-jare la rikolto estis bona kaj la kompano estas kontentigita, kvankam la prezoj de la sekalo estas tre malaltaj. Blankrusa kamparano estas tre modesta, al kutimigita al malgranda rikolto kaj ofte malsatas. Sed ni estas certaj, ke la novstarigita agrikultura fakultato de la Universitato kaj multaj agrikulturaj lernejoj de malalta tipo, kiuj jam ekzistas, rapide korektos la ĝis nun ne tre favoran situacion de blankrusa kamparano. **O. B.**

## JACEK MALCZEWSKI NE VIVAS...!

**J**acek Malczewski ne vivas... Ekzistas frapoj, kiujn oni antaŭvidas jam de iom longa tempo, sed kiam ili fariĝas doloriga realo, ili efikas surdige. La morto de Nestoro de pola pentrarto estas ne nur perdo por la pola arto. En tiu nomo, en tiu persono enhaviĝis krom tio io alia, io ankoraŭ pli valora, ol povas esti eĉ plej granda galerio de plej eminentaj bildoj.

Jacek Malczewski jen enkorpiĝo plej bela kaj plej nobla de la epoko, kiu jam finiĝis, jam fariĝis historio, sed en ĝi enskribiĝis sur la plej laŭdinda karto, eĉ pli: historio jam estante ĝi formas fundamentojn de la nuntempa vivo.



Ĉiuj doloroj kaj malesperoj de l' postdividaj tagoj, ĉiuj ĝiaj doloroj kaj plendoj, ĉiuj revoj kaj esperoj en Lin enkorpiĝis. Li ne estis ilustranto de plej profundaj poemoj de nia granda poezio romantika kiel „Anhelli“ de Słowacki, tio estis en mizeran homan korpon ensorcita la plej pura pola penso, la plej profunda pola sento.

Estas en verkaro de Jacek Malczewski sekretoj kaj enigmoj. Sed ĉu povis esti alie, kiam tiu ĉi penso kaj tiu ĉi sento de Polo de malliberaj tempoj baraktis inter mallumaj densaĵoj inter la senespero kaj flameto de espero.

Estas en la arto de Jacek Malczewski iaj preskaŭ malamaj amaroj kaj dolore skurĝanta ironio. Ĉu povis esti alie, se Polo de postdispartigaj tagoj ne unu foje malbenadis la tutan mondon, malbenadis sin, al Dio insulte jetadis malhonorigon, ke li estas „caro“ — kaj kelkiam kontraŭe ridis per sarkasma, laciga rido, dronante en malpura marĉejo de la epoko, kiu mokis pri idealoj?

Sed super ĉio, super la doloro kaj malespero, super la ploro kaj ironio ekzistas ĉe Malczewski, samkiel ĉe Wyspiański, antaŭsento de leviĝanta matenruĝo. Ne en tondroj ĝi malkaŝiĝas, kiel ĉe la verkinto de „Akropolis“, sed en kortuŝa, humila preskaŭ fido al Dio, ke li ja kompatos malfeliĉan nacion kaj la tutan mondon per favora okulo rigardos...

Pro ĉio ĉi tio la tuta nacio kaj tiu ĝia parto, kiu komprenis la animon de Jacek Malczewski kaj tiu, kiu nur instinkte ĝin komprenis, la tuta nacio ekamis Lin per amo alia, mil foje pli arda, ol oni amas eĉ plej grandajn siajn artistojn, ĝi havis tiun senton por Li antaŭ jaroj, kiam ĝi estis en la mallibero, ĝi havis ankaŭ dum la tagoj de reviviĝinta Polujo.

## JACEK MALCZEWSKI.

**P**lastika verkaro de Jacek Malczewski estas kompleta esprimo de sia epoko, de tendencoj en la arto kaj de agordoj en la pola socio de l' lasta periodo antaŭ la reakiro de l' sendependa politika ekzistado.

Dank' al forto de l' inspirita genio kaj krea individualeco — tiu ĉi artisto prezentas per si mem tute apartan, laŭ la enhavo kaj la formo, tipon de l' plastikisto, posedante alian similulon nek en la pola nek en la fremda arto. Se evidentigaĵas ĉe li jen ĉi tie jen tie kelka rememoraĵo, aŭ rebrilo de l' fremdeco — tiam nur kiel duagrada formala eco, ekstera, dum la fundamenta enhavo kaj tono de lia arto estas lia plej supera individua proprajo. Kiel potenca titano de l' plastika verkado, staras Malczewski mem, ignorante ĉiun konvenciaĵon egale en la arto kiel en la vivo.

Ĉar tion, kion tiu ĉi artisto verkis, alifandis en la tiglo de sia potenca individualeco, saturante per flamo de l' fantazio, per profundeco de l' penso kaj riĉeco de l' verka koncepto.

Menso de Malczewski ĝisfunde lirika, reflektita, formata per vicia romantika literaturo kaj politika tragedio de l' pola nacio — serĉis solvon de l' estado kaj senditecon de sia nacio en historio de l' mondo pere de arto, oftfoje sur la fono de l' samtempaj tiamaj oka-



zajoj. Li mem poeto, verkinto de l' agordigaj pentritaj poemoj, serĉis inspiron por siaj konceptoj en la vizia poezio de Słowacki, kies kulton inokulas de junaĝo en animon de l' artisto lia patro.

Kaj kvankam la artisto prenadis temon pure vizian, enpaŝadis per sia krea penso en fantazian, mistikan mondon — li donadis al siaj konceptoj realajn formojn, esprimataj per bonega formo kaj koloro, klare kaj kompreneble, igante kredi realan ekziston de l' verkoj de sia imageco. Facileco de artista esprimado, apud abundeco de plastikaj konceptoj, permesadis al la artisto solvi ĉiun ideon, ĉiun koncepton.

Kaj la enhavo de tiu ĉi verkaro de Malczewski estas la pola nacio, ĝia martirologio kaj senditeco en la vivo de popoloj. Tial ĝuste estas, ke oni opinias Malczewski'n plastika kontinuantulo de l' mesianista ideo de niaj poetoj, kaj ne malpli de l' patrioteca ideologio de Artur Grottger.

Komence Malczewski verkas aron da kompozicioj kun fantazia, romantika enhavo, ĉerpataj el fabeloj kaj popolaj legendoj pri nimfoj, niksoj en realista formo de genera kompozicio — simile kiel pli aĝa ol li Witold Pruszkowski. Poste en tiun mondon de l' popola fabelo la artisto enkondukas diversajn kreaĵojn de fantaziaj pegazoj, faŭnoj, himeroj, kiel esprimon de animo de l' naturo, personigon de homa penso, mensaj ecoj aŭ de homa karaktero.

Sed la ĉefa enhavo de l' verkaro de Jacek Malczewski estas postdispartiga historio de nia patrujo, martirologio de pola nacio, kies spiriton la artisto plifortigadis per majesteco de sia verka penso, per espero de pli bona morgaŭo — en libera kaj sendependa Polujo.

Kaj tiel kreiĝis potencaj konceptoj, plenaj de profunda penso kaj patriota agordo, drama esprimo, terurego kaj sufero. Tio estas kompozicioj, parte inspirataj de poezio de Słowacki, kiel „Morto de forpeltino“, „Ellenai“, „Anhelli“, „Eloe“, aŭ prezentantaj sorton de „Forsenditoj“ en Sibiro, kien en „Etapoj“ iris „Du generacioj“ ktp. Ĝis la granda kompozicio s. t. „Melankolio“. En ĉi lasta la artisto, en sia profeta inspiro, vidas proksimiĝantan tagon de l' liberiĝo de la mallibero — en lumo de libera matenruĝo, al kiu flugpendas figuroj, simbollantaj tiujn historiojn de martireco kaj mallibero, kaj ekflugojn kun arma faro al — Libereco. Tiu profeta verko devenas de 1894 j.

Egalrangan temon al historio de malliberigita Polujo formas en la verkaro de Malczewski demando de ekzistado, rilato de homo al la vivo kaj arto, kiun la artisto solvas sur la fono de siaj propraj travivaĵoj. Esprimo de tiuj pensoj de l' artisto estas nombraj kompozicioj, kiujn komencas granda vizio s. t. „Erara rondo“, kaj poste sekvas: „Mia Muzo“, „Himero“, „Gloro“, „Morto“, „Alaŭdo“ kaj ciklo de „Venenita puto“.

Plua, oni povus diri, tria enhavo de pentristaj planoj de Malczewski, jen konceptoj religi-patriotaj, satplenigitaj de historiozofia senco, kaj entreprenitaj de la artisto post eksplodo de la mondmilito. Partopreno de pola soldato en la milito, igas la artiston, sur la fono de mesianista senditeco de Polujo, eldiri plastike sian plej altan vorton de profeta inspiro, kiu jam antaŭe tiel multe gravis en la verkaro de Stanisław Wyspiański. Ĉu tiu sango de niaj patroj, elversita iam dum bataloj por nia libero, tiuj nombraj sangaj oferoj de l' junularo



dum la insurekcioj, kaj poste hodiaŭ en vicoj de Legioj fariĝus vanaj? Ĉu tiuj „Kampoj de ostoj“ de pola soldato ne elpetos Dian pardonon, por ke „Polonia“ povu reveni al atendantaj ĝin filoj en libera Polujo? Ja „Nike“ kondukis vicojn da legianoj en peno kaj laco al la Venko!

Ankaŭ religia mistikismo, kolorita de patriota sento, trovis sian profundan kaj specifan esprimon en multaj komponaĵoj, kiel „Tobiasz“, „Kribeto“, „Nekredema Tomaso“, „Groŝo porlua“ kaj m. a., ofte en multaj kaj variaj solvoj.

Kaj kion fine oni povas diri, rigardinte tiun grandegan galerion de portretoj: de infanoj, virinoj, junuloj kaj maturaj viroj, de tiuj nombraj tipoj, plenaj de nekomparebla kaj specifa karakteristiko kaj esprimo. Aparte oni devas rimarki bonegajn studaĵojn de bestoj kaj birdoj, kaj precipe de pejzaĝo, plena de hejma sento kaj idilia agordo.

Ĉiu verko de tiu ĉi artisto karakteriziĝas per bonega formo, desegna perfekteco kaj specifa koloraro. Abundeco de konceptoj, vario de solvoj, klara kaj travidebla plaro kaj konstruo de bildo, ligiĝas kun homogeneco de teknika efektiviĝo, kaj majstreca desegno ligas sin kun forta modelado. Koloro, komence metata en brunaj tonoj, poste evoluiĝas en plenan riĉecon de impresia brilo.

La arto de Jacek Malczewski, dank' al sia individualeco kaj eksterordinara aparteco, agas ne nur sur niajn estetikajn sentojn, sed antaŭ ĉio stimulas al refleksio, al pripensado kaj konsiderado per profundo de sia penso, verka imageco kaj perfekteco de formo.

**Mieczysław Dąbrowski.**

**I. ESPERANTISTA KONGRESO DE BIAŁYSTOK'A VOJEVODA REGIONO**  
okazos en BIAŁYSTOK (Polujo) la 26—27. X. 1929, sub la alta protekto de la BIAŁYSTOKA URBESTRO W. HERMANOWSKI.

La honora Komitato de la Kongreso konsistas el: Prof. R. Młyński, Dro Z. Semaszko, D-ro A. Rajgrodzki (Prezidanto kaj vic-prez. de la Urba Konsilantaro), D-ro M. Ziemilski — vic-urbestro, Prof. D-ro O. Bujwid — prez. de PED, D-ro K. Wittek — Vojevoda Inspektoro, M. Jurecki — Lerneja Inspektoro, S-ino B. Mejlach — honora membro de Z. E. S., W. Świdorski — urbestro de Lomża kaj A. Metelski — direktoro de la Regna Gimnazio en Grajewo. Kiel honoraj gastoj estas invititaj la anoj de la ZAMENHOFA FAMILIO.

LA PROGRAMO de la Kongreso estas jena:

La 26. X. Akcepto de kongresanoj kaj interkonatiĝa vespero en la Salono de Zam. Esp. S-to.

La 27. X. je 9.30 Solena malfermo de la Kongreso en la Salono de l' Urba Konsilantaro, 10.30 Unua laborkunsido, 12.30 Vizito al Zamenhofa naskdomo kaj komuna fotografado, 13.30 Komuna tagmanĝo, 15.00 Dua laborkunsido, 18.00 Propaganda prelego kaj Fermo de la Kongreso.

Krom la oficiala parto la Kongresa programo entenas ankaŭ PREZENTADON de originala esperanto-revuo „Nia Ĝardeno“ (je 20:30) kun la opereto „Ho, tiuj fremduloj!“, BALON (11.30) kaj BANKEDON je honoro de la alvenintoj post la Balo.

La kongreskotizo estas zł. 5: La kongresanoj ricevas liberan eniron al ĉiuj aranĝoj de la Kongreso, gvidlibron tra Białystok, kongresan libron kaj laŭeble senpagan loĝejon.

Estas DEVO de ĉiu esperantisto de BIAŁYSTOK'A WOJEWÓDZTWO NEPRE partopreni la Kongreson. Pollandaj kaj eksterlandaj esperantistoj estas ankaŭ plej kore invitataj.

venu GRANDNOMBRE, TUJ anoncu Vian alvenon, deziron havi senpagan loĝejon, specialan prelegon en Laborkunsidoj, anoncon en Kongresa Libro ktp. Informpetojn kaj aliĝojn direktu al la Kongresa Organiza Komitato-BIAŁYSTOK, Kupiecka 49.

Prezidanto: J. Śapiro.

Sekretario: F. Kurjański.



**agamja** (*bezzenność*) celi-  
bato, senedz(im)eco, fraŭ-  
leco  
**agapa** (*ekl.*) agapo  
**agawa** (*bot. z lilijowców*)  
agawo  
**agawa** amerykańska (*aloes*)  
aloo  
**\*agent** detektivo, sekreta  
policisto; peranto, agan-  
to, faktoro  
**agent provokator** agen-  
to; provokatoro, provoki-  
sto  
**\*agitator** ribeliganto, agi-  
tisto,  
**aglomerat** aglomer(a)jo,  
aglomerato  
**agnat** (*krwiny z ojca stro-  
ny*) agnato  
**agnoskovaĉ** ekkoni, re-  
koni, agnoski  
**agregat** (*zbitōr*) agregato  
**\*agronom** agronomo, ter-  
kulturisto,  
**agrykultura** agrikulturo,  
kampkulturo, terkulturo  
**ajent** patrz: agent  
**akatolicki** akatolika, ne-  
katolika  
**akcentowanie** akcentad-  
(maniero)  
**akcentuacja** akcentado,  
akcentigo  
**akcesista** akcesisto, kandi-  
dato  
**akcesyt** (*pochwala w kon-  
kursie bez nagrody*) ak-  
cesito

**akcja serca** korbatado,  
ko funkciado, koragado  
**akcydent** akcidento, mal-  
feliĉo, malfeliĉa okazo  
**\*akczyza** impost(office)jo  
**akolasta** diboĉulo  
**\*akrobata** jonglisto, ekvi-  
libristo, akrobatisto, ŝnur-  
dancisto, pintmarŝisto  
**akrocefaliczny** pintokapa  
**akroterje** (*ark.*) (*wystawy,  
krańce, narożniki da  
chu*) akroterio  
**\*aktor** histriono, scen(lu-  
d)isto  
**aktywa** (*stan czynny ma-  
jątku*) aktivo  
**aktywalny** (*w czynnej  
służbie*) aktiva, en akti-  
va servo  
**aktywny** aktiva, aga, age-  
ma (*czynny*)  
**aktywum** (*gram.*) (*strona  
czynna*) aktivo  
**\*akumulator** amasigilo  
**akurat** ĝuste, akurate, (*a-  
kuratnie*)  
**akuszerja** akuscienco, a-  
kuŝfako, tokologio  
**akuzatyw** akuzativo, kva-  
ra kazo  
**akwaforta** (*rysunek che-  
miczny*) akvaforto  
**akwamaryn** (*min.*) *beryl  
szlach.* akvamarino  
**akwatynta** (*miedziorzy*)  
akvatinto  
**akwedukt** akvadukto, ak-  
vokondukilo

A

**\*a dume** (*tymczasem*), an-  
stataue (*na omitast*)  
**a kiedy** (*nie chce*) kaj ta-  
men, sed (*mi ne volas*)  
**a kŕoż to?** kiu do? kiu  
jen? kiu nu?  
**abaddon** (*hebr.*) abadono,  
inferprofundegajo  
**abdellach** (*arab.*) disklavo  
**abderytyzm** abderitismo,  
naivegoco, stulteco, abd-  
eritsaĝo, abderitmo, ab-  
deritkutimo  
**abdominalny** (*med.*) abdo-  
mena, ventra, ventreca,  
subventra  
**\*abdykacja** (*polit.*) rezigno  
**\*abdykovaĉ** rezigni  
**\*abecadło** aboco  
**abelek** (*wypraw. skórką*)  
bovidledo  
**abjadykacja** (*praw.*) pri-  
juĝo, forjuĝo, senigo  
**ablaktacja** (*med.*) ablakto,  
ablaktacio, demamigo  
**ablatyw** (*gram.*) ablativo,  
instrumentalo  
**ablegacja** (*ekl.*) ablegateco  
zigo

**ablegat** ablegato, papa  
sendito  
**ablegier** (*ogr.*) bingono,  
markoto, branĉoplantajo  
**ablucja** (*ekl.*) ablucio, man-  
lavo forlavo  
**ablucenja** (*med.*) abluenco,  
laksigo, laksigilo  
**\*abnegacja** sinofero, re-  
zigno  
**abnormacja** (*med.*) abnor-  
maĝo, abnormeco, nenor-  
maleco  
**abolicia** (*praw.*) abolicio  
punprocesuligo, nuligo  
**abomasum** (*anat.*) (*zółq*  
*dek odżuwaczy*) abomaso  
**\*abominacja** kontraŭemo,  
malŝatego, antipatio, ma-  
linklino, malamego  
**abordaż** alborĝigo  
**abortus** (*med.*) abortajo,  
abortitulo, abortuso  
**aborygen** (*etn.*) aborigeno,  
aŭtohtono  
**abrewiacja** mallongigo,  
epitomo, resumo, konci-  
zigo



- abrogacia** (*prav.*) legesen-validigo, legesenvalorigo
- abrys** plano, projekto, skizoj, konturo
- abscysa** (*mat.*) absciso
- absencja** foresto, foresteco
- absentować się** forestadi (*być nieobecny*), eviti (*unikac'*, manki (*brakować*))
- \*absolucja** (*ekl.*) absolucio, indulgenco, pardono (*przebaczenie*)
- absolut** (*filoz.*) abso-lut(e)o.
- \*absolutny** despota, senindulgata (*niepobawiają-cy*) senkondicia (*bezwzględny*)
- absolutorium** absolutorio, (*instr.*) absolvato
- absoluty** absolvo, liberigo, aprobo (*al raportu pri tura estrado*)
- abstrahować** ne atenti
- abstrahujac** senrigarde, flanklasante, apude-pretlasante, nekonside-rante, nerepektante, ne atentante, neenkalkulante
- \*abstrakcja** abstrakcio
- abstynenculo** abstinentulo
- \*abstynencja** abstinemo
- absurd** absurdo, absurda-jo, absurdeco
- absyda** (*ark.*) absido (*astr.*) absiso, apsidio

- adamowy strój** nudeco, senvesteco
- adamusia** (*zool.*) adamasio
- adaptacja** adaptio, adaptajo, alfaro, alformigo, alĝustigo, altaŭgigi
- adaptować** adapti, alkon-formigi, altaŭgigi, alĝus-tigi
- addukcja** (*med.*) adukcio
- adenja** (*med.*) adenio, ma-sano de limfaj gangloj
- adenom** (*med.*) adenomo (*nabrzmienie gruczołów*)
- \*adept** partiano, akiritulo
- adherent** partiano, aliĝinto
- adhezja** (*fiz. patol., jur.*) adhezio
- adhabiczny** adhabata, nepenetrebla por varmoo
- adjacent** limalbaro
- adjudkacja** aljuĝo
- adjuutor** helpanto
- adjuutum** helpa monaldono
- adjuwacja** adjuvado, hel-pado
- adlars** aldonitulo, helpan-to
- \*ad libitum** laŭvole, laŭ-plaĉe
- admirant** (*admirator*) ad-miranto
- \*adopcja** fil(in)igo, filraj-tigo
- \*ad patres** al prapatroj, al mortintuloj
- \*ad rem** al afero, al ĝu-sda enhavo
- adulować** flataci
- adwersarz** kontraŭulo
- adynamiczność** adinamio, senforteco
- aerobium** revulo
- aerobium** (*mikrob.*) aero-vivulo, aerobulo
- aerodrom** aerodromo
- aerodynamika** aerodina-miko
- aerofobia** (*med.*) aerofobio (*choroba nerw.*)
- aerologia** (*med.*) aerologio
- aeromancja** aeromancio, elaeorodveno, elaeopro-fetado
- aerometr** aerometro
- aeroplan** aeroplano, avia-dilo, flugmaŝino
- aeroza** (*med.*) a-erozo (*po-wietrze w cieple*)
- afazja** (*bezgłos*) afazio
- afekcja** afekcio, emocio, kortuŝo, ekscitiĝo, eksci-teco
- afejsjum** (*astr.*) afelio (*od-sionezność*)
- afera** afero, aventuro, kon-flikto, okazintajo
- afereza** (*gram.*) aferezo, vortmalongigo
- afirmatwa** konsento
- \*afisz** avizo, prospekto, reklamo, anonco
- aforja** (*med.*) senfrukteco, sterileco
- afonia** (*med.*) afoniceo, senvoĉeco
- \*afont** malhonorigo, insulto, frontigo



# AL ĈIUJ GRUPOJ EN POLLANDO!

Laŭ decido de E. K. de P. E. D. ni volas prepari kompletan statistikon de la esperanta movado en nia lando, por ke ni ricevu pri ĝi klaran bildon. Ĝi estas por ni necesa por nia estonta laboro. La statistiko multe helpos nin kaj samtempe donos al ni necesan kaj fidindan materialon por nia interna kaj ekstera uzo. La unua paŝo estos la statistiko pri grupoj. La presajon ni sendas al ĉiuj grupoj, sed se iu ne ricevos ĝin, bonvolu postuli ĝin aŭ skribi la statistikon laŭ suba maniero. La statistikon sendu al: J. Alfus, Kraków XXII, Al. Dembowskiego 10.

**Ekzekutiva Komitato de P. E. D.**

Urbo

## STATISTIKO

pri la grupoj.

- 1) Nomo de la grupo: .....
- 2) Dato de fondiĝo: .....
- 3) Fondintoj: .....
- 4) Nunaj Estraranoj: .....
- 5) Nombro de la membroj en la I. jaro: .....
- 6) Nombro de la membroj nun: .....
- 7) Adreso de la grupo: .....
- 8) Kunvenejo: .....
- 9) Ĉu ekzistas en la urbo aliaj grupoj, ties adreso: .....
- 10) Ĉu ekzistas aliaj grupoj en via vojevoda distrikto (adreso): .....
- 11) Kiom da kursoj okazis: .....
- 12) Kiom da partoprenantoj: .....
- 13) Apartenas aŭ ĝis nun ne apartenas al P. E. D.: .....
- 14) Aliaj citindaj datoj: .....

# WULFILAS

Dro LUTHER — Dro ZAMENHOF.

**L**a biblio kaj supre menciitaj tri nomoj por ĉiam kune kunrestos. Kial?

Kion menciindan li faris, Wulfilas, episkopo de la germana gento de okcident-gotoj (341)?

Lia ĉefa merito estis traduko de la biblio — kiel unua en la germanan (tiam gotan) lingvon. Per tio la germanoj unuafoje ion skribe eksciis pri la biblio. La plej ampleksa kaj plej grava manuskripto de la gota biblio estas la „arĝenta kodekso“ (Codex argenteus) en la universitata biblioteko en Upsala (Svedujo). El la iamaj 330 paĝoj ankoraŭ ekzistas 177.

Kaj kion rimarkindigas Dro Luther? (1483—1546). Li ne nur estis granda reformatoro, sed li per sia bibli-traduko, fundamentita sur la oficiala komerc- (kontor) lingvo en la supra-saksa dialekto, kreis unusolan skriblingvon por norda- kaj suda-germano. Li estis la unua, kiu riskis tiutempe germanen traduki la biblion, ĉar dekreto de la imperiestro Karlo 4 de la j. 1369 kaj eĉ de la arki-episkopo Bertoldo de Mainz (1486) ĉe puno de eklezi-eksigo malpermesis presigadon de germana bibli-traduko, sed vane. Dro Luther do nun al la granda amaso de popolo komigis la enhavon de la s-ka skribo, kaj en lingvo, kiun la popolo komprenis — nome la ĝis hodiaŭ por ĉiuj germanoj iĝinta literatur-lingvo.

Nun finfine kion kreis Dro Zamenhof?

Nia kara majstro ne ebligis legi la biblion por unu sola gento — kiel Wulfilas, li ne nur komprenebligis la enhavon por unu sola popolo kiel Dro Luther, — sed li donis al ĉio la kronon, esperantigante la biblion por ĉiuj anoj de la tutmonda familio.

**Joseph Janoschka.**

## OD REDAKCJI.

Z numerem dzisiejszym rozpoczynamy druk uzupełnień do słownika polsko-esper. Grabowskiego (wydanie większe). Z powodu nagromadzenia się aktualnego materiału jesteśmy zmuszeni odłożyć druk stronicy tytułowej i przedmowy do następnego numeru, w przyszłości jednak zamierzamy na słownik poświęcać stale dwie środkowe kartki (4 stronic), a numerację stron podawać w ten sposób, by po wyjęciu słownika nie był widoczny w komplecie rocznika żaden brak.

Zwracamy się do Sz. Czytelników z prośbą o wszczęcie propagandy w celu podniesienia liczby prenumeratorów naszego pisma, by przedsięwzięty obecnie druk uzupełnień do słownika przyniósł korzyść jak największej ilości Samideanów i ze żmudnej pracy, której wymagało przygotowanie do druku tych uzupełnień, mogła jak największa liczba osób korzystać! Chodzi o wczesne uregulowanie ilości nakładu naszego miesięcznika. Redakcja byłaby skłonna powiększyć objętość pisma, o ile wzrośnie również wydatnie liczba prenumeratorów. Niech każdy uważa za swój obowiązek pozyskanie przynajmniej jednego nowego abonenta.

Równocześnie ponawiamy swą prośbę w sprawie dalszego zbierania uzupełnień do słownika Grabowskiego. Wyrazy ułożone w porządku alfabetycznym należy przesyłać pod adresem: WP. Dyrektor Józef Orzech, Tarnów, II. Gimn. Państw. Rozumie się, że chodzi tylko o wyrazy w słowniku Grabowskiego (wyd. więk.) nie zamieszczone.

SCIIGO DE LA LASTA MOMENTO: VENONTJARA UNIVERSALA KONGRESO OKAZOS EN OXFORD (ANGLUJO).  
Red.



# RIGARDO KIUN MI NE POVAS FORGESI.

**P**ost belega kongreso en Budapeŝt ni ripozis en Belatelep ĉe hungara lago Balaton, kie agrabligis al ni la restadon bonkorulo (esperantisto) S-ro Matolĉi.

Post 10 taga ripozo ni veturis hejmen tra Budapeŝt. En vagono kaptis mian atenton iu knabo. Li stavis ĉe la malfermita fenestro, proksime de mi. Ĉifona vesto, nudaj malpuraj piedoj kaj malgrandaj manetoj (kun postsignoj de iama „manicure”) — ĉio ĉi estis en forta kontrasto kun la kapo. Haroj tranĉitaj ĝishaŭte, vizaĝo pura, kvazaŭ ĵus lavita, pala kun esprimo de ia sopiro kaj enuo. Oni povus diri, ke la kapo pro ia sorteraro troviĝis sur la ĉifono. Okuloj malhelaj, pensemaj, rigardo, fiksita en la forkurantana malproksimon de la belega Balatonpejzaĝo, ŝajnis adiaŭi iun aŭ ion karan pordaŭre, eble por ĉiam.

Mi ne povis satrigardi la knabon. Li sentis mian rigardon. Ĝi kvazaŭ ĝenis lin.

Senhejma orfo? Aŭ eble?... Ne, neeble! Lia vizaĝo kontraŭdiras ĉian malbonan suspekton.

Simpla almozulo?... Nek li la unua, nek la lasta.

Tion decidinte mi aliĝis al vigla interparolo de nia plej proksima societo. Sed tio ĉi neniel sukcesis.

La knabo tutplene ekokupis miajn persojn.

Por unu momento mi sukcesis kapti lian rigardon.

Ĝi kvazaŭ diris:

— Kial vi studas min? lasu min trankvila.

Eble ĉio ĉi nur ŝajnis al mi? Eble mi estis sub forta sugestio de mia antaŭhieraŭa vizito en la orfodomo en Belatelep?... Fine la knabo ekokupis liberan lokon apud mi. Nun mi eksentis, ke niaj roloj ŝanĝiĝis: mi estis observato, kaj li — la observanto. Mi kvazaŭ sidis ne sur mia loko.

Eble doni al li iun moneron?... Se li ne prenos?

Do eble ĵeti la moneron en lian malfermitan poŝon?

Se la poŝo havas truon? Kion fari?... Fine mi sukcese kaj nerimarkite ĵetis en lian poŝon 2 monerojn.

Kiam la konduktoro venis kontroli biletojn, mi forte ektimis pro la knabo kaj jam estis preta pagi por li. Sed je mia granda miro la knabo havis bileton ĝis Budapeŝt.

Verŝajne li veturas en la urbon serĉi laboron.

Ni eligis el valizo vespermanĝon. Mi volis proponi al la knabo mian porcion.

Se li ne prenos, ĝenata?...

Do, eble — kukon?

Kukon li prenis. Lian palan vizaĝeton lumigis ruĝiĝo de la kontenteco. Kia domaĝo, ke mi havis nur unu kukon! (ĉiujn 6 formanĝis miaj 2 (du) kunvojaĝantinoj). La knabo videble gaiĝadis.

Mi gajnis lian fidon.

Ho, kial mi ne scias lian lingvon!

— Sinjoro! — diris iu dika najbarino — se vi volas al li doni monon — donu, se ne — ne donu! kial fari tragedion?

La virino pravas. Eble mi faras nebezonan agordon?

Kaj jen mi decidis senceremonie doni al la knabo monon. Sed mia mano ne obeis min.

Mi petos lin porti niajn valozojn al aŭtomobilo.

Ĉu li havos forton?... Li estas ja tiom delikata...

Do mi petos lin malsuprenpreni ilin de la breto.

Cetere, faru li kion-ajn, nur mi havu la pretekston doni al li monon.

Fine la vagonaro brue haltis sur la Budapeŝta stacidomo. La knabo eksaltis al la fenestro. Sed la dikulino maldelikate forpuŝis lin, kaj, malferminte la buŝegon, laŭte ekkriis:

— Portisto!

La knabo paliĝis. Kolerero kaj rezignacio luktis en li. La dikulino puŝadis lin ĉiuflanken. Kurante de loko al loko, ŝi alkrōcis iun kofron kaj kune kun ĝi falis teren. Enkuris portistoj. Oni levis la ĝemantan dikulinon.

Mi serĉis la knabon. Li staris en angulo. En liaj okuloj perlis larmoj. Lia vizaĝo estis ruĝa.

Li rigardis min.

Ho, tiu ĉi rigardo!...

Portisto kaptis niajn valizojn, mi kapadiaŭis la knabon kaj, enpuŝinte en lian manon 1 pengon (hungara monero), mi elsaltis el la vagono.

Longe poste kaj ofte nun mi vidas tiun rigardon.

Mi sentas kvazaŭ riproĉon de la neplenumita devo.

Ho, malfeliĉa knabo! kion vi volis diri? kia plendo pendiĝis sur viaj lipoj? Kvankam vi ne eldiris ĝin, mi divenas, mi komprenas vin.

Kaj jen en nomo de miloj da senhejmaj orfoj mi vokas al ĉiuj vi, sataj, kontentaj kaj havantaj varman hejmon:

Senhejma malriĉa orfeto kiel ĉevoja estas planteto.

Vi povas ĝin emi aŭ malemi, sed neniu rajtas ĝin piedpremi!

**Feliks Zamenhof.**

## ĈE LA TOMBO DE NEKONATA SOLDATO \*)

(Impresoj el Budapeŝto).

**T**ie, kie finiĝas la strato de Andrassy, ĉe la bela urba parko, etendas sin al la ĉielo alta monumento. Amaso da floroj tie kuŝas, sur ĉevalo gardestaras soldato, ĉio montras, ke tio ĉi estas ia nacia sanktaĵo, io tre kara al tiu urbo.

Tombo de nekonata soldato! Kiom da similaj tomboj, kiom da monumentoj el bronzo aŭ marmoro oni vidas en la postmilita Eŭropo! Sango ne ŝprucas plu hodiaŭ, sed la nacioj ne forgesis. La monumentoj restis — nekonataj Abeloj akuzas nekonatajn Kainojn.

Multe oni jam verkis kaj fantaziis pri nekonata soldato. Poezia imago prezentas lin jen kiel patron, orfigantan infanojn, jen kiel junu-

\*) La unuan fojon en la historio de la esperantaj kongresoj en Budapeŝto la esperantistoj metis florkronon sur la tombon de nekonata soldato.



lon, kiu pereas for de la amatino kaj neniam vidos la blankajn rozojn el la soldata kanteto...

Kion ajn kreus fantazio, en realeco estas la faktoj: en la tero kadavro de mortigito, sur la tero — monumento, restonta por jarcentoj kaj kovrata per floroj, floroj, floroj.

Miopaj estas tiuj, al kiuj tia monumento ŝajnas nur monumento de milita gloro. Ili ne vidas larmojn, mikasantajn sin kun la floroj, ne sentas la senvortan preĝon de miloj da koroj, ke neniam plu en sangaj bataloj pereadu nekonataj soldatoj, ili ne komprenas, ke tia monumento, ekstere gloranta la ombrojn de i' milito, estas en sia plej profunda senco potenca krio pro paco.

Sed bone komprenis tion ĉi la aro de samideanoj, kiuj dum unu el la belaj kongresaj tagoj respektive vizitis tian tombon en la ĉefurbo de Hungarujo. Ne sonis elokventaj paroladoj. Unu post la alia en silento ni klinadis la kapojn.

En nia aro estis diversaj homoj. El diversaj landoj. Viroj servokapablaj, kiuj ne forgesis ankoraŭ la malserenan tempon, kiam, embuskante en tranĉeoj, ili direktadis siajn pafilojn kontraŭ la malamikoj. Homo pafas, Dio trafas. Kaj nur Dio scias, ĉu la kuglo, kiu traboris la korpon de la nekonata soldato, ne estis elpafita per la manoj de iu el la ĉeestantoj.

Ne militon ni gloris en tiu momento. La kadavro, kuŝanta tie en la tombo, ne estis por ni kadavro de patrujdefendinto, ĉar ni estis fremdaj en tiu lando. Tie, sub la monumento, levanta sin supren, kiel manoj de preĝanto levas sin al la ĉielo, kuŝis HOMO. Kaj antaŭ tiu ĉi homo, unu el niaj proksimuloj, ni klinis la kapojn, ni, homoj el diversaj nacioj.

Ni metis florkronon kaj foriris. Denove ni troviĝis sur la vivopulsantaj stratoj. La tomba monumento, la eterna akuzo de Abel kontraŭ Kain, restis malantaŭ ni. Antaŭ niaj okuloj baldaŭ ekflirtis la verda standardo, ornamenta la kongresejon, kaj la orelojn deflanke ekirapis la himno pri la nova sento, kiu venis en la mondon, por disbati la miljarajn murojn inter la popoloj.

**Lidja Zamenhof.**

## INTERESA RIMARKO DE UKRAJNANO.

En septembra n-ro (38) de Skolta Heroldo ni legas en artikolo de Petro Isajiv sub titolo „Ukraina skolta organizaĵo“ jenon:

„Evoluo de U. S. O. renkontis gravajn malfacilaĵojn flanke de la ŝtataj estraroj, kiuj evoluon de Ukraina popolo, eĉ nur kulturen, konsideras kiel danĝeron por unueco de la ŝtato“.

Ni petas do la aŭtoron de ĉi artikolo, ke li bonvolu montri efektivajn faktojn — kie kaj kiam tio okazis, ĉar ĝis nun ni aŭdis nur pri la helpo flanke de la ŝtataj estraroj al ĉiu kultura penado de ukraina popolo. Kaj ni volas scii la veron. Eble... ni eraras.

Samtempe ni mencias, ke en la sama artikolo la aŭtoro „iomete“ eraris, ĉar ne tuta Galicio apartenis iam al Rutenujo, sed nur ĝia orienta parto. Ni ne suspektas lin tute pri la malbona volo, kaj nur tial petas lin, ke li pli studu polan geografion kaj historion, se li pri ili ambaŭ emas skribi.

Ni esperas do, ke ĉiuj malkomprenaĵoj inter frataj popoloj malaperos en nia homama Esperantujo.

**J. T.**



## POLLANDA KRONIKO.

**BARANÓW** n. **Wieprzem**. S-ro B. Jóźwicki, Del. de UEA, enkondukis Esp. en lokan popolan lernejon. Kurson partoprenas 31 lernantoj de sesa kaj sepa klasoj. Instruas s-ino Anna Hawryluk. Kurso por ĝeinstruistoj en preparo.

**BIAŁYSTOK**. La loka esper. S-to post la aŭgustaj ferioj rekomencis sian, vigan agadon. La unua en nuna sezono entrepreno de la S-to, estis la **KURSA SOLENO** okazinta la 28. IX. en la ejo de Klubo „Hellas”, kiun ĉeestis preskaŭ 200 personoj. La Solenon inaŭguris per parolado en esp. kaj pola lingvoj la prezidanto de la S-to S-ro J. Szapiro. Finante la parolon li transdonis al S-ro Ŝevaĥ kaj F-ino T. Borowicz la premiojn por la bonega sukceso en la kurso. Tion sekvis paroladoj de reprezentanto de kursanoj, de kurs-ĝvidanto S-ro A. Jaworski kaj de la Societa Sekretario S-ro F. Kurjański. La lasta ankaŭ transdonis al la kurs-ĝvidantoj S-roj Doroško kaj Jaworski librodonaĵojn en la nomo de la Komitato. La oficialan parton de la Soleno finis la „Esperanto Marŝo” piane prezentita de S-ro K. Szapiro. La dua parto estis dediĉita al Koncerto en kiu partoprenis la membroj de la artista rondeto de la S-to: F-inoj R. Porozowska, M. Zadworzańska, S-roj S. Osowicki, M. Serlin, Halpern, Apfelbaum kaj fine la okjara fraŭlino S. Mekler, kiu rikoltis speciale multajn aplaŭdojn por la kanteto „Sunleviĝo”. Post komuna kantado de la himno, komenciĝis amuzoj kaj dancado. La Soleno faris bonan efikon. Komenciĝis novaj kursoj kun granda partoprenantaro, sub ĝvido de S-ro Doroško.

La Unuiĝo de Oficistoj anoncis malfermon de Esperanto-kurso por sia membraro.

La loka S-to estas multe okupita pri preparado de Regiona Kongreso de Białystoka Województwo, kiu sub protekto de la Urbestro okazos la 26—27. X. Estas atendata multa partopreno de ĝesamideanoj el proksimaj kaj malproksimaj lokoj. Pli detale aliloke.

**KRAKÓW**. En ĉi tieaj skoltinaj grupoj malfermiĝis kurso de Esperanto dank' al tre favora sinteno de f-inoj J. Pisztkówna kaj M. Terplitzówna. La kurson, kiun aliĝis 100 skoltinoj, ĝvidas laŭ la senpera metodo de pastro Ĉe — s-o Hoda-kowski. Entuziasmigitaĵ kursaninoj vekas plej bonajn esperojn de plenfrukta laboro.

**ŁOMŻA**. Komenciĝis novaj 5 grupoj (po 15 personoj en ĉiu). Instruas S-ro M. Perelman. Ankoratŭ 2 grupoj, el kiuj unu speciale por instruistoj, estas aranĝataj.

Ĉi-tie fondiĝis Esp. S-to. Kiel prezidanto estas elektita S-ro D-ro M. Perelman, Sekr.-F-ino R. Markiewicz.

**ŚWIECIE** n. **Wisła** (Pomorz). Gojĝan sciigon anoncis al ni s-ano prof. Józeŝ Ŝolnerek, kiu en loka ŝtata gimnazio aranĝis kursojn kun lernantoj, kiuj en nombro de pli ol 100 partoprenas ilin kun granda entuziasmo. Ni kore gratulas al nia fervora pioniro prof. Ŝolnerek pri tiu sukceso vere imitinda.

**WARSAWA**. La Pola Esp. Societo anoncas sian postferian relaboron per kunvenoj, okazantaj ĉiulunde kaj ĉiujaŭde (le la 8-a vesp. en ejo ĉe strato Nowy Świat 27 m. 8), per kursoj dufoje semajne, malfermo de biblioteko (ĉiujaŭde de 8—10 vesp.) kaj legejo (malfermita ĉiulunde kaj ĉiujaŭde). La 24 k. m. okazos prelego de s-o Cense s. t.

„Impresoj pri mia lasta vojaĝo”.

Ankaŭ la Akad. Esp. Rondo ĉe Juda Hejmo (Nowy Świat 21) anoncis al ni pri rekomenco de kursoj. Sekretariejo, biblioteko kaj legejo malfermita ĉiudimane kaj ĉiujaŭde de 8—10 vesp.

Varsovia filio de „Laboro” (Marszałkowska 81. ĉe adv. Litauer) kies ejo troviĝas nun ĉe strato Długa 19. kunvenadas ĉiumerkrede de 8—9 vesp. Estas organizataj ankaŭ kursoj.

**WASILKÓW**. Esperanto-kurson malfermas Zam. Esp. S-to el Białystok, sub ĝvido de S-ro M. Doroško.

**WILNO**. S-ro I. Kamenecki ĝvidas Esperanto-kurson en la Teknika Lernejo.

**EDZIŜO**. S-ro M. Goldberg, membro de Zam. Esp. S-to en Białystok edziĝis kun F-ino F. BRAMSON. Koran gratulon.

**MORTO**. Mortis la patro de samideano M. Waserŝtejn, membro de Zam. Esp. S-to en Białystok. Piej korajn kondolencojn.



## URBESTRO DE GRAJEWO W. PERLITZ

El Grajewe, urbo ĉe pol-germana limo, venas malĝoja sciigo pri morto de tiea urbestro W. Perlitz.

La Mortinto estis vera Esperantisto, kvankam Li mem ne posedis ankoraŭ nian lingvon. Li apogis per sia aŭtoritato la Esperantan movadon en Grajewe, prezidis dum la publika propaganda kunsido en la salono de Urba Konsilantaro kaj faris ankaŭ varman salutparoladon en la nomo de la urbo dum malfermo de Esperanta kurso ĉe la regna gimnazio. Por plie manifesti sian simpatian al nia afero Li aliĝis al UEA.

Pro sia fervora laborado por bono de la urbo Li gajnis simpatian ĉe la tuta loĝantaro. Tion plene pruvis grandioza enterigo, partoprenita de amasoj da homoj.

Li ripozu en paco!

Sinceran kondolencon al Lia familio.

J. Ŝ.

## KRONIKA ZAGRANICZNA.

### ANGLJA.

**Sheffield:** Miejskie biblioteki zakupiły książki esperanckie dla kursów, organizowanych przez „Kleriga Asocio por Laboristoj”. Biblioteki w tym mieście posiadają znaczną ilość różnych książek esperanckich.

Z okazji corocznej wystawy esperanckiej Miejski Komitet Wychowawczy rozesał okólnik do wszystkich szkół, aby pozyskać nauczycielstwo dla sprawy esperanckiej.

### FRANCJA.

**Paryż:** Stowarzyszenie „La Domo de Esperanto” zorganizowało w dniu 28 VIII. br. przez radjostację na wieży Eifel konkurs na esperanckie programy radjowe. Rozdane nagrody osiągnęły kwotę 5.000 franków.

### WEGRY.

**Budapeszt:** W gazecie codz. „Magyarság” oraz w „Budapešti Hirlap” ukazały się artykuły o esperancie i sprawozdania z kongresu budapeszteńskiego. Szczególne znaczenie dla rozwoju esperanta na Węgrzech mają artykuły Dra Ozoray, głównego dyrektora Seminarjum Wychowawczego, ukazujące się w czasopiśmie partji rządowej.

### HOLANDJA.

**s' Gravenhage:** T-wo „Haga Esp. Unuigo” zorganizowało loterię esperancką w Borsø, przy udziale 48.000 osób. Sprzedano 6.000 losów, które przyniosły ogromny dochód na cele esperanckie.

### SZWECJA.

**Bjuv.** Po próbnej lekcji p. Morariu zgłosiło się 120 kursistów.

**Helsingborg.** Lekcja próbna p. T. Morariu spowodowała zapisanie się 200 uczniów na kursy esperanckie. Ogółem w okolicy Helsingborgu uczęszcza na kursy p. Morariu, prowadzone metodą ks. Cze, ponad 500 osób.

### JUGOSŁAWJA.

**Lublana:** W maju br. ukończył kurs esperancki 30 członków Związku Drukarzy. Po ukończeniu kursu absolwenci utworzyli własną sekcję przy Klubie Esperantystów w Lublanie.

### BUŁGARJA.

**Sofja:** Ligilo por Vidantoj, oficjalny organ związku ociemniałych esperantystów ogłasza w Nr. 9 z r. 1929, że w Sofji istnieje związek ociemniałych esperantystów, który liczy około 80 członków. Prezesem związku „Balkana Stelo” jest p. St. Neukov. Związek został założony w r. 1921.

Oprócz tego związku istnieją w Bułgarii jeszcze dwa towarzystwa esperanckie ociemniałych, a mianowicie „Protektanta Asocio por Blinduloj” i „Temnia” (Mallumo).

### NIEMCY.

**Lipsk:** „Arbeiter-Esperantist” w Nr. 9 z września 1929 r. donosi, że nieoczekiwanie wielka ilość esperantystów-robotników wzięła udział w IX. Wszecchwiatowym Zjeździe Esperantystów-proletariuszy w Lipsku w pierwszych dniach sierpnia br. Ilość uczestników wynosiła przeszło 1.100 osób z 29 różnych krajów.



## TRADUKA KONKURSO.

La plej bona solvinto gajnos libropremion en valoro de 4 zł. (Lasta dato 30. XI. 1929):

**Fraszka.** Idylla maleńka taka: wróbel połyka robaka, wróbla kot dusi nie-cnota, pies chętnie rozdziiera kota, psa wilk z lubością pożera, wilka zadławia pantera, panterę lew rwie na ćwierci, lwa — człowiek, a sam po śmierci staje się łupem robaka. Idylla maleńka taka. (M. Rodoc).

Tradukoj versformaj estos preferataj.

**Dr. Dreher.**  
Kraków  
Starowislna 37.



## UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO.

POLA TERITORIO. Ĉefdelegito: J. Szapiro, Lipowa 33, Białystok.  
Konto ĉe PKO No 60.047.  
OFICIALA BULTENO No 11.

**FINO DE ASOCIA JARO.** La asocia jaro 1929 baldaŭ finiĝas. Ĝoje ni konstatas grandan progreson de UEA en Polujo dum la jaro 1929: la membraro pli-grandigis, ankaŭ kreskis la Delegitaro. Malnovaj amikoj de nia Asocio, dum kelkaj jaroj restantaj for de niaj vicoj, realiĝis al UEA. Tamen nesufiĉa ankoraŭ estas la disvastiĝo de nia Asocio en la Zamenhofa patrujo. Ni ne atingis eĉ duonmilon da membroj kaj tiel restas en la laŭnombra statistiko je malproksima loko, inter multe pli malgrandaj landoj.

Ĉiam ankoraŭ restas aro da nerepagintoj. Al ili ni denove direktas alvokon pri realiĝo. Ni petas insiste, ke ili konservu sian fidelecon al UEA kaj repagu sian kotizon al la loka Delegito aŭ direkte al la Ĉefdelegito. Ĉiuj realiĝantoj ricevos senprokraste la ampleksan Jarlibron kaj ĉiujn ceterajn dokumentojn.

**RESPONDKUPONOJ DE UEA.** Ni atentigas, ke la unua serio de respondkuponoj de UEA estas uzbla ĝis fino de Decembro n. j. La Centra Oficejo reakceptos tiujn respondkuponojn ĝis la 31-a de Decembro n. j. Membroj, posedantaj tiujn kuponojn, povas ĝis la 15-a Decembro n. j. sendi ilin al la Ĉefdelegito, kiu pagos al ili la valoron aŭ laudezire sendos novajn respondkuponojn. Nun vendataj estas nur novaj respondkuponoj, validantaj ĝis la 31-a de Decembro 1932. Tiuj respondkuponoj estas oportune uzblaj por malgrandaj pagoj eksterlanden (afranko de respondo, mendado de libroj, gazetoj ktp.). Kajero, enhavanta diversajn kuponojn por sumo de 9 sv. fr. kostas kun rekomendita afranko 18 zł. Unuopaj kuponoj kostas sen afranko: 30-centima — 60 groŝojn, 50 ct. — 95 gr. kaj 1 fr. — zł. 1,90. Mendu la kuponojn ĉe la Ĉefdelegito aŭ ĉe via loka Delegito.

**REGIONA KUNVENO DE UEA-ANOJ.** Dum la I. kongreso de Esperantistoj de Białystoka vojevoda regiono la 27-an de Oktobro n. j. en Białystok okazos kunveno de UEA-anoj kaj Delegitoj. Ankaŭ ne-UEA-anoj rajtas ĉeesti. Ĉiuj Esperantistoj estas kore invitataj al tiu kunveno.

**STATO DE UEA EN POLUJO.** La 1-an de Oktobro 1929 ni havis en Polujo 414 membrojn (3 DM, 4 MS, 252 MA kaj 155 M). Pro komparo ni notas, ke la 1-an de Oktobro 1928 UEA havis en Polujo nur 314 membrojn (diferenco: 100 membroj).

**NOVAJ DELEGITOJ.** Ni informas la mebraron pri jenaj novaj Delegitoj: **KORZEZ** (Wołyń). D. F-ino Fela Zawodnik, instruistino, ul. Szkolna 10. **STANISŁAWÓW.** D. F-ino Lusja Karpen, oficistino, Kołłątaja 28.

**VD.** Michał Gurawski, studento, ul. Dąbrowskiego, Dom Kolejowy, drzwi 14.

La membroj bonvolu ankaŭ noti la jenan adresanĝon:

**GRODNO.** D. Aleksander Menczyński, instruisto, Zamkowa 7a m. 4.  
Białystok, la 1. 10. 1929. **J. Szapiro,** Ĉefdelegito de UEA.

### PRESERARO.

La lastaj „Of. Bultenoj” en „Pola Esp.” estis erare numeritaj. Per la nuna „Oficiala Bulteno N-o 11” la ĝusta numerado estas restarigata.



# KATALOG KSIĘGARNI POLSK. AKAD. T-wa ESP.

WARSZAWA, ULICA LESZNO 99, m. 5. TELEFON 198—37.

Baghy — Pilgrimo . . . . .	2.80
Baliński — La lasta kravato de Aleksy, trad. Karolczyk . . . . .	0.40
Bałucki — Kuzeto, trad. Grenkamp . . . . .	0.60
Barwna pocztówka przedstawiająca grób Zamenhofs . . . . .	0.30
Cart — Pri landnomoj . . . . .	0.70
Czubyński — Esperantyzm . . . . .	3.00
Dobrzański — Al mokantoj . . . . .	0.25
— Esperanto u nas . . . . .	0.10
Edgar Poe — La Puto kaj la Pendolo (rakonto el Hispana Inkvizicio) . . . . .	0.85
El polaj Kristnaskaj kantoj (kun muziknotoj) . . . . .	0.30
Fredro — Consilium facultatis, trad. A. Grabowski . . . . .	1.50
Frenkiel — Verdaj fajreroj . . . . .	0.90
Grabowski — Nova Antologio . . . . .	1.00
— El parnaso de popoloj . . . . .	5.00
— Słownik esp. — polski (mniejszy) . . . . .	1.80
— Słownik pol. — esp. (większy) . . . . .	3.30
Grenkamp — Krijoj de l' koro . . . . .	0.50
Jarkolekto de „Pola Esperantisto” 1908 . . . . .	4.00
„Koro” — muziknotoj de foxtrott — black-bottom kun vortoj de R. Schwarz . . . . .	3.00
Szilágyi — Poemaro el Hungarlando . . . . .	4.00

(C. d. n.)

Przyjmujemy prenumeratę „Polskiego Esperantysty” rocznie zł. 8.00, półrocznie zł. 4.00. — Na wysyłkę doliczamy 20 proc. przy zamówieniu do zł. 6, — przy wyższym 10 proc. Książki wysyłamy na odpowiedzialność zamawiającego. Za przesyłkę poleconą ponadto doliczamy zł. 0.50. Książki wysyłamy po otrzymaniu pieniędzy. Zamówień za zaliczeniem nie przyjmujemy.

## Libreja Fako de „Pola Esperantisto”

Kraków, ul. Smoleńska 9. Konto PKO. 496.660.

### REKOMENDAS :

Poŝtkartoj propagandaj „Babel” 10 pecoj . . . . .	0.50
Glumarkoj „Babel” 10 pecoj . . . . .	0.10
Insignoj esper. (steloj) po 1.10, 1.20, 1.30, 1.40, 1.50, 1.70, 2.10, 2.30, 4.50.	
<b>La verkoj de Zamenhofs:</b>	
Fundamenta Krestomatio . . . . .	5.60
Fundamento de Esper. (5-lingva) . . . . .	2.30
Lingvaj Respondoj . . . . .	2.80
Proverbaro Esperanta . . . . .	2.70
Andersen — Fabeloj I. kaj II. parto po . . . . .	4.40
Goethe — Ifigenio en Taurido . . . . .	3.30
Gogol — La Revizoro . . . . .	3.30
Heine — La Rabeno de Baharah. La Gimnazio . . . . .	2.30
Molière — Georgo Daudin . . . . .	1.75
Orzeszko — Marta . . . . .	5.50
Schiller — La Rabistoj . . . . .	3.30
Shakespeare — Hamleto . . . . .	2.75



Albanio — Gvidlibro	0.60
Albumo de l' VIII en Kraków. Luksege eldonita kun 600 fot.	15.00
Ama stelaro	1.10
An-Ski — Dibuk. Teatrajo	1.25
Avsejenko — Fraŭlino Suzano	2.00
Balucki — Kuzeto. Komedio en trad. de S. Grenkamp	0.60
Bonnels — Solandro	2.20
Bujwid O. prof. — Kvin prelegoj pri bakterioj	1.00
— La aplika de radioj ultraviolaj al sterilizo de akvo	0.35
Bukedo — I. kaj II. Rakontoj de diversnaciaj aŭtoroj po	1.20
Butin — Faŭsto. Komentario al la I-parto	0.60
Carl i Borel — Esperanto w 10 lekcjach	1.20
Czubryński — Esperanto i Esperantyzm	1.20
— Esperantyzm. Wyd. II.	3.00
Dobrzański — Al mokantoj	0.45
Dreyfus — La vangraŭpo	1.00
Fredro — Consilium facultatis. Komed. trad. Ant. Grabowski	1.60
Grabowski Ant. — Nova Antologio	1.60
Grenkamp-Kornfeld — Krijoj de l'koro. Poeziajtoj	0.50
— Penseroj. Legindaj precipe en kursoj	0.75
Grillparzer — La monaĥejo ĉe Sandomir	1.30
Gryff — W sprawie nauki języków obcych	0.50
Hebbel — Gyges kaj lia ringo	6.50
Hiller — Ho, tiuj fremduloj, opereto	1.40
Ilustrita Gvidlibro tra Pollando kaj Danzig—Gdańsk, eldon. de la P. E. D. Kraków	1.50
Jung — La alta kanto de la amo	1.80
Kant — Al eterna paco	4.40
Kaplan — Akordoj esperantaj	0.80
Karínthy — Morgaŭ malene	2.60
Klucz do Esperanta — Brzydkie kaczkę	0.60
Kongreslibro de l' VIII. en Kraków. Riĉe ilustrita	1.00
Kriess — Melodoj de l' nokto. Poeziajtoj	1.00
Lange — Libroj de profetoj, ses poemoj; trad. Ant. Grabowski	1.50
Lessing — Minna de Barnhelm	4.30
Lippmann — Sprachliche Gutachten	2.00
Maléronda terbiblio	2.00
Mickiewicz — Improvizacio de Konrad	0.50
— Sinjoro Tadeo, trad. Ant. Grabowski	6.50
Multatuli — Historio de Saidjach kaj Adinda; eld. Liem Tjong, Hie Semarang — Java	1.85
Oberrotman kaj Jung — La lastaj tagoj de D-ro Zamenhof	2.60
Polaj Kristnaskaj Kantoj	0.35
Privat — Vivo de Zamenhof	5.40
Prozo el danaj-norvegaj aŭtoroj	1.50
Ramo — En Svislando	4.80
Reymont — En fumejo de l' opio, novelo; trad. D-o K. Bein (Kabe)	1.20
Schmidt — La amkonkurantoj	0.85
Slowacki — La patro de pestuloj el El-Arish, trad. Ant. Grabowski	1.40
Staff — Aŭtunaj agordoj, trad. Tuwim	1.00
Sapiro — Babiladoj de bonhumora Zamenhofano	1.00
Troj kaj Zakopane	0.50
Trochimowski — Kwestja języka międzynarodowego 10 ekz.	1.00
Turno — Kompletny podręcznik Esperanta; wyd. III.	1.25
— Wyższy kurs	1.50
Vigny — La intervidigo kaj nekonita dialogo	0.90
Wiesenfeld — Galerio de Zamenhof. Kun 18 portretoj	2.40
Wysłouch — El lando de ruinoj	0.45
Zamenhof, D-o Leono — Mia liro	1.10

Nur antaŭpago. — Por sendkostoj aldonu 10%.

Por rekomendita sendajo plu 0.50 zł. La sendajon nerekomenditan ni ne garantias.